PILO-PRESS

Internacia

Informservo

N-ro 42/1975 27 nov 1975
Aperas ĉiusemajne

Sukcesa internacia vortaro

Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj

Prezo 65,- GM

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 463649; 514269



Mendu ĉe Pilo-Press!

## Pri faka agado

## Intervjuo de Pola Radio kun UEA-prezidanto

Varsovio (pp) - La Esperanto-redakcio de Pola Radio disaŭdigis dum la du pasintaj Esperanto-Ekspresoj intervjuon kun la UEA-prezidanto, d-ro Humphrey Tonkin, farita de redaktoro Andrzej Pettyn. El la ampleksa intervjuo ni hodiaŭ publikigas jenan parton, kiu temas pri faka agado en Esperanto.

Demando de Andrzej Pettyn: En viaj lasttempaj paroladoj vi multe da loko kaj tempo dediĉis al la faka agado. Kiel do - ĉu vi povus nun kelkvorte almenaŭ diri - tia faka agado devus viaopinie disvolviĝi kiendirekte kaj ĉu en tiu faka agado aŭ ne povus aŭ devus ni utiligi ekstermovadajn fortojn?

Respondo de Humphrey Tonkin: Bone ke vi faris tiun duan parton de la demando, ĉar pri tiu mi havas tre fortan opinion, nome, ke estus bone se en la praktika agado de niaj diversaj fakaj asocioj ktp. ni pli forte kunligu*kun ekstermovadaj rimedoj kaj fortoj. Tre ofte en la faka agado niaj interesoj bone kongruas kun ankaŭ ne-esperantistaj fakaj organizoj; estus bone se ni kunlaboru sur tiuj kampoj.

Por la faka agado ĝenerale - ŝajnas al mi ke ĝuste la praktika utiligo de Esperanto estas gravega por la antaŭenigo de nia afero ĝenerale. Ĝi estas ankaŭ tre grava kiam temas pri la evoluigo de la lingvo. Ni foje forgesas pri la graveco de la altigo de lingvoscio kaj pri la graveco de - kiel diri - fleksado de la lingvo. Tiuj aferoj estas tre esencaj kaj ĝuste la praktika utiligo de Esperanto en la diversaj fakoj plifortigas la lingvon mem. Mi aldonu ankaŭ ke en la planado ĝenerale en la Esperanto-movado tiu faka agado ricevu prefere pli da atento ol ĝi nun ricevas. Mi multe admiras la laboron kiun faras kelkaj en la diversaj fakaj asocioj kaj kiuj estas ligitaj al UEA kaj mi esperas, ke UEA en estonteco povos doni pli da helpo al tiuj diversaj fakaj asocioj.

*kunligiĝu

************

## Interlingvistiko

Moskvo/Varsovio (j.u./pp) - En la unua kvarono de la venonta jaro aperos en la eldonejo "Nauka" (La Scienco) en Moskvo la delonge antaŭanoncita libro pri interlingvistikaj demandoj. Ĝi estas anoncita en la oficiala katalogo de la venontjaraj eldonaĵoj de "Nauka" (Katalogo SK 1/76 parto 1-a, ero 348). La libro titolita "Problemoj de interlingvistiko" enhavas aron da disertaĵoj prilaboritaj de la sovetaj sciencistoj-kunlaborantoj de la "Interlingvistika Sekcio" de la Lingvoscienca Instituto de la Scienca Akademio de Sovetunio.

La informnoto en la katalogo emfazas ke la libro estas sekvo de la grandega kresko de interesiĝo pri interlingvistiko en la mondo. La nova interlingvistika publikaĵo scienca aperanta en Sovetunio eldoniĝos en 10 000 ekzempleroj. Oni povas ĝin antaŭmendi pere de libro-importaj establoj kunlaborantaj kun la soveta "Meĵdunarodnaja Kniga".

## Deklaro de la Estraro de GEA

Bad Hersfeld - La 22-an kaj 23-an de novembro 1975 kunsidis la Estraro de Germana Esperanto-Asocio r.s. Dum la kunsido de estraro i.a. verkis jenan deklaron:

"La estraro de Germana Esperanto-Asocio rifuzas reagi al iuj cirkuleroj kaj alispecaj intervenoj, kiuj misfamigas Germanan Esperanto-Asocion, Universalan Esperanto-Asocion kaj Esperanton. Kvankam estus tre facile kontraŭargumenti kaj -pruvi, la estraro sin plene dediĉas al pozitiva laboro por la Internacia Lingvo kaj agas senkompromise laŭ § 2 de la statuto de Germana Esperanto-Asocio el 1954, nome nur por la disvastigo de Esperanto, kio ekskluzivas ekonomiajn, politikajn, religiajn aŭ mondkonceptajn aktivecojn. Same laŭstatuta (§ 3,2) estas la membreco de Germana Esperanto-Asocio en la neŭtrala Universala Esperanto-Asocio."

## Zamenhof-festoj

Mannheim (pp) - Zamenhof-festo por la Esperanto-amikoj Mannheim-Ludwigshafen okazos la 13.12.1975 je la 15-a horo ĉe Carl-Duisberg-Gesellschaft. Heinrich Nischwitz, trezoristo de GEA, parolos pri aktualaj problemoj de la germana Esperanto-movado kaj montros filmon pri la germana Esperanto-kongreso en Oberkirch 1975.

Stuttgart (pp) - La ĉi-jara Zamenhof-festo de grupo Stuttgart okazos sabate, je la 13-a de decembro, je la 18,30 horo, en Hotel Herzog Christoph, Stuttgart 1, Büchsenstr. 37 (stutgarta ĉambro).

## Pri informado kaj instruado

Nürnberg (pp) - Esperanto-Inform-Servo Nürnberg dissendis al germanaj lokaj grupoj kaj unuopaj agantoj cirkuleron kun enketilo pri la rezultoj de informa kaj instrua laboro dum 1975 kaj kun la peto priskribi la spertojn en informado kaj instruado.

La statistikan rezulton ni nur povos publikigi fine de la jaro, ĝis la plej multaj demanditoj respondis. Sed hodiaŭ ni komencas la publikigon de komentoj kaj spertoraportoj.

Hartmut Trunte de Laborrondo Esperanto ĉe la Universitato Bonn skribas:

"Konsciante, ke estas malfacile organizi Esperanto-kursojn por diversaĝaj, malsaminteresaj homoj kun malsamaj antaŭ-scioj, ni decidis koncentriĝi ĉe varbado al studentoj. Tamen ofte partoprenis niajn aranĝojn ankaŭ nejunuloj kaj nestudentoj, sed ilin ni ne varbas speciale. La ĉefa obstaklo ĉe la varbado estas financa kaj la problemo, ke pro malfacilaj studkondiĉoj studentoj havas ĉiam malpli da tempo. Plej sukcesa montriĝis persona varbado kaj varbado per manskribitaj afiŝoj. Disdonado de flugfolioj alportis eĉ ne unu interesiĝanton.

Informvesperoj estas ĉiam malsamaj. Foje necesas fari informan prelegon, sed plej ofte tiuj, kiuj venas, jam estas preskaŭ pretaj partopreni kurson. La timemon kaj mankon de diskutemo ni iome sukcesis malhelpi ĉe la lasta informvespero, kiam ni fiksis informafiŝojn sur la muroj kaj senkoste disdonis vinon kaj fromaĝon. Granda nombro da esperantistoj devis provoki diskutadon, ĉe kiu unu esperantisto devis paroli ĉiam kun unu aŭ du neesperantistoj. Tiel kreiĝis situacio simila al persona varbado.

Pri informado kaj instruado (daŭrigo)

La komenca kurso post multjara sperto jam ne prezentas malfacilaĵojn. Ni postulas neniajn hejmtaskojn, kio povus fortimigi tiujn, kiuj ne havas multe da tempo, sed regule montriĝas, ke ili tamen laboras hejme kaj baldaŭ petas aldonan legmaterialon. La komenca kurso okazas laŭ Cseh-metodo kaj koncentriĝas al parolkapablo. Unu monaton post la komenco (post kvar aŭ kvin lecionoj), ni aranĝas Esperanto-feston, unuan de la semestro, kiun partoprenu ĉiuj komencantoj kaj laŭeble ĉiuj aliaj. Estas speco de interkona vespero, dum kiu - kiel ĉe ĉiuj niaj festoj - oni parolas nur en Esperanto. La lingva nivelo ne estas ĉiam egala, sed ankaŭ okazas, ke ĵusaj komencantoj jam flue parolas dum seshora festo.

Ĉefa problemo estas teni la homojn, kiuj finis komcan [en] kurson. Ofte ili nur ankoraŭ venas al la festoj, sed ne al daŭriga kurso. Necesus konvinki ilin pri la neceso de daŭriga kurso, necesus membrigi ilin en iu Esperanto-asocio. Sed tie ni renkontas argumentojn de mankanta tempo kaj mono. El la nomitaj homoj nur kvin estas membroj de UEA, sep membroj de GEA, tiel ke entute naŭ estas regule informataj individue. Veki intereson por libroj - krom lernolibroj, gramatikoj kaj vortaroj - estas malfacile kaj normale sukcesas nur, se oni povas montri la aĉetotan libron. En daŭriga kurso, kie mi proponis aĉeton de libro, ili preferis ricevi fotokopiojn de legota materialo, ol aĉeti tutan libron. Pro tio ni kelkfoje aranĝas libroekspozicion el nia privata havaĵo, sed granda la sukceso ne estas."

Esperanto en Radio (pp)

700 por la "kosma nombro"

La Esperanto-redakcio de Pola Radio ĝis la 27a de novembro ricevis pli ol 4 300 korespondaĵojn dum 1975. Do mankas nur 700 korespondaĵoj por atingi la "kosman nombron" de 5000 korespondaĵoj. 4 700 korespondaĵoj - laŭ la ĝisnunaj spertoj - certe alvenos ĝis jarfino. Kiu skribos la mankantajn 300? Se vi, kara leganto, ĉiusemajne skribos nur 1 poŝtkarton aŭ leteron, tiam la Esperanto-redakcio de Pola Radio eniros la kosman eraon! Ne preterlasu tiun unikan ŝancon!

Trarigardo de Esperanto-gazetaro

Nun, post Radio Zagrebo, kiu regule dum la lasta elsendo de ĉiu monato recenzas la ricevitajn Esperanto-periodaĵojn, nun ankaŭ la Esperanto-Redakcio de Pola Radio enkondukis rubrikon en sian kadran programon sub la titolo "Trarigardo de Esperanto-gazetaro". Tiun novan rubrikon oni aŭdos dufoje en la monato!

Vieno kantas en Esperanto

Ĉiam denove Vieno surprizas siajn aŭskultantojn! Ĉifoje je la fino de la elsendo oni povis aŭdi la kanton "En Prater floras la arboj" de Robert Stolz kantitan de s-ino Hube en Esperanto. Tiun Esperanto-version povis ankaŭ aŭdi la spektantoj de Aŭstria Televido en programero pri la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Cetere, s-ino Hube estas la edzino de la direktoro de la Esperanto-muzeo.

Pri Locarno

D-ro Arthur Baur de la Kurtonda Svisa Programo parolis interese pri la kontrakto de Locarno antaŭ 50 jaroj kaj ĝia fina malsukceso. Ges-roj Gacond daŭrigis sian prelegon pri Literatura Mondo. Certe ĝi estas interesa, sed ĉu necesas dediĉi la elsendotempon de tuta aŭtuno? Ĉu vere ne ekzistas aktualaj problemoj?

# Konkurso de Pola Radio

**10-tagaj ekskursoj**

**valoraj objektaj premioj**

atendas la eksterlandajn geaŭskultantojn de Pola Radio, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj de nia konkurso:

1) **Kion vi opinias pri la rolo de la sindikatoj en la solvado de la aktualaj problemoj de la laborula mondo.**
2) **Kion vi scias pri la kreiĝo kaj agado de la Monda Federacio de la Sindikatoj?**
3) **Kiujn virinojn vi konas, kiuj — laŭ via opinio — ludis grandan rolon en la internacia vivo aŭ havas meritojn por via lando?**

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ la adreso:

**Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, Poŝtkesto 46, Pollando**

— en kovertoj signitaj per la devizo „Konkurso" —
ĝis la 31-a de decembro 1975 j. (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro 1976.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras bonŝancon en la lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn.

POLSKIE RADIO
Warszawa